

# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)  
revuo pri fervojo



ISSN 1397-4270

## 2019.6


La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



## Urba trafiko en Poznano

## Estimataj gelegantoj,

En la ĵus finiĝanta jaro festis nia federacio 110-jaran datrevenon de sia ekesto. Tiel longa vico da jaroj en la vivo de unu organizo ne estas neglektinda. Ekzistis aliaj pli grandaj, potencaj kaj pli riĉaj societoj de entuziasmuloj kun noblaj ideoj, kiuj malaperis en abismo de historio. Ni estu fieraj, ke niaj antaŭuloj sukcesis dufoje dum ekzistado de nia movado renovigi ĝian laboron post ĉesigo kaŭzita de teruraj mondmilitoj. Sur tiu loko estas taŭge rememori ĉiujn, kiuj per siaj fortoj kaj scioj, iam malgrandaj iam pli grandaj, meritis pri tio, ke ni nun povas daŭrigi en ilia laboro. Nin kunigas ne nur Esperanto, sed ankaŭ admiro kaj intereso pri fervojo, kiu estas profunde enradikigita en niaj kapoj. Ni estimu tion kaj klopodu ne vantigi tion, kion ni heredis.



**Enhavo:**

Forpasis L-Ch. Zaleski-Zamenhof .....	116
Estrarkunsido de IFEF en Poznano .....	116
Nadlorelo fleksebla unuprofila .....	118
Transponta Kongreso (TRAKO) .....	122
72- IFK Aliĝilo, provizora programo .....	125
Bitarkivo kaj Bitotekoj.....	130
Transsiberia Fervojo daŭrigo .....	131
Agado de Landaj Asocioj.....	137
Alvoko .....	139
Jara enhavo.....	140

Titolpaĝo: Tramlinio antaŭ la kastelo en Poznano.

**Internacia Fervojisto**

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**

**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) rodica\_todor@yahoo.com

**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz

**Gvidanto de la Faka Komisiono:** Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

**Membroj de la Redaktora Komisiono**

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**

Guido Brandenburg (Germanio)

Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko)

**Bank-Konto:**

**Nomo:** „Laurent Vignaud”

**IBAN:** FR3320041010110929374Y03237

**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo:** www.ifef.net

**Facebook:** <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

## **Forpasis Louis-Christophe ZALESKI-ZAMENHOF**

Naskiĝis 23.1.1925 en Varsovio, mortis 9.10.2019 en Parizo.

L-Ch. Zaleski-Zamenhof estis doktoro-inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, nepo de L. L. Zamenhof. Li studis en Varsovia Politekniko kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. Esperanton li eklernis en 1934 kaj de tiam li partoprenis multajn Universalajn Kongresojn kaj eĉ kongresojn de IFEF. Lastfoje li salutis gepartoprenantojn de la 69-a IFEF-kongreso en Colmar 2017.

Laŭ Gazetara Komuniko de UEA

## **Estrarkunsido de IFEF en Poznano**

Aŭtuna laborkunsido de la IFEF estraro okazis ĉijare en Poznano de la 21-a ĝis la 24-a de Septembro. La elekto de kunsidloko ne estis hazarda. Ĝin influis kelkaj kaŭzoj. La ĉefa estis planita akcepto ĉe dekano en Politeknika Instituto Poznano kaj vizito en sidejo de Federacio de Sciencaj kaj Teknikaj Asocioj (NOT). Plia estis konata ARKONES-aranĝo, dum kiu okazis LKK-kunsido de la 72-a IFK. Alia estis fervoja foiro TRAKO en Gdansko kaj laste la kunveno de FISAIC-estraro en Stargard kiun partoprenis Jan Niemann. Post ĝi li alkroĉis sin al jam kuranta kunsido.

Tagordo de la kunveno estis fakte plenŝtopita per multaj programeroj. Komence la prezidantino informis pri sia partopreno dum ARKONES en kunveno de organizantoj de la Frankfurta kongreso (Ronald Schindler, Johann Pachter, Robert Kamiński, Elzbieta Karczewska). Ĉiokaze ŝi ricevis informojn pri la ĝisnuna situacio, kiujn la estraro pridiskutis (ĉefe pri la programo de la fervojista parto de la kongreso).

Labora parto de la estrarkunsido poste daŭris laŭ la tagordo per organizaj kaj financaj aferoj, agado interne de IFEF kaj eksteraj rilatoj.

Interalie la prezidantino detale informis pri sia vizito en Belgio ĝuste antaŭ la estrarkunsido kie ŝi traktis kun belgaj amikoj pri la ĵus fondita nova asocio de Belgaj Amikoj de Fervojistoj-Esperantistoj (BAFE) kaj pri la eblecoj organizi la 74-an IFEF-kongreson en Belgio. Ŝi eĉ vizitis

kelkajn lokojn konvenajn por organizado de la kongreso. Interparolo kun la belgaj geamikoj estos daŭrigata en la venontaj monatoj.

Lunde antaŭtagmeze la 23-an de Septembro ni estis akceptataj ĉe la dekano de Poznana Teknologia Universitato, Fakultato de Transportinĝeniereco prof. F. Tomaszewski kaj liaj kunlaborantoj. Dum la kunveno, kiu pasis en amika kaj sencoplana atmosfero, la dekano informis nin pri 100-jara datreveno de fondiĝo de la universitato kaj 75 jaroj de ĝia fako kiu okupiĝas pri baza konstruado de relveturiloj, ilia diagnoziko, analizo de bruo kaj riskoj. Prezidantino Rodica Todor informis la polajn kolegojn pri IFEF, pri ĝia laboro kaj celoj kun substreko de la intenco organizi en Poznana Teknologia Universitato seminarion por studentoj. Doc. Jaroslav Matuška prezentis al ili



Antaŭ la Poznana Universitato

proponon de fakaj prelegoj kun diversaj temoj, kiuj povus esti tie prezentitaj en Esperanto kun interpretado en polan lingvon. La dekano promesis kunlaboron en preparo de la seminario, kiu povus okazi en Februaro

2020. Kun intereso li akceptis proponon de kontrakto pri kunlaboro inter Poznana Teknologia Universitato kaj IFEF.

Dum la vizito en la universitato ni trarigardis laboratorion de bruo-analizo, kie oni okupiĝas pri sistemoj de bruosensiloj kaj analizo de ricevitaj signaloj kun celo malkovri malĝustaĵojn en pasantaj veturiloj. Plue ni vidis ankaŭ laboratorion por dinamika simulado de vagon- aŭ tramboĝioj. La fakultato rekte kunlaboras kun diversaj polaj entreprenoj, kiuj produktas fervojajn- aŭ tramvojjajn veturilojn. Fine de nia vizito ni havis eblecon vidi la novan modernan konstruaĵon de la universitato kun granda aŭditorio, lernoĉambroj kaj areoj por studado. Post nelonga paŭzo sekvis alia grava kunveno en Domo de Tekniko (kie okazis malferma kunveno dum la 60-a IFK en la jaro 2008) kun

gvidantoj de pola Federacio de Sciencaj kaj Teknikaj Asocioj (NOT) mag. inĝ. K. Pawlicki kaj Societo de inĝenieroj kaj teknikistoj de komunikado (SITK) mag. inĝ. Bresch. Dum la kunveno ni interŝanĝis informojn pri niaj organizoj. NOT kaj SITK organizas diversajn konferencojn,



Kun gekolegoj el NOT

seminariojn, instruadojn, teknikan inspektadon ktp. La prezidantino invitis ilin prelegi dum la 72-a IFK en Frankfurto/O.

La tuta estrarkunveno kaj ambaŭ vizitoj estis tre bone preparitaj de nia kolego Wiesław Libner al kiu ni sincere kaj tutkore dankas.


**Ladislav Kovář**

## **Nadlorelo fleksebla unuprofila**

*Taglibraj notoj dum la jarkunsido de UIC-terminologoj en Gdansko*

La tramo baptita „Arthur Schopenhauer” memorigas min pri la historiĉa grundo sur kiu vivas slavoj, prusoj, germanoj, poloj, komercistoj, kavaliroj, sciencistoj, filozofoj kaj multaj pliaj. Sed - kvankam mi antaŭĝojas pri baldaŭa rendevuo kun esperantistaj estontaj amikinoj, kiuj promesis klarigi al mi la urbon - mia misio en Gdansko estas partopreni kunvenon de la UIC-terminologia grupo. Do mi eniras la menciitan tramon kaj post kvaronhoro atingas la ekspozician terenon *Amberexpo* kie okazas TRAKO, la fervoja foiro. La lokon de unua renkontiĝo la invito indikis iom malprecize. Mi tial vizitas la diversajn enirejojn, el kiuj ĉiuj povis esti la ĉefaj kaj serĉas konatajn vizaĝojn. La strategio montriĝas sukcesa kaj post kelkaj minutoj Juha-Heikki, la finna kolego estas kolektinta telefone la aliajn serĉantojn. Sergey, reprezentanta OSJD (Organizo pri kunlaboro inter fervojoj), la oficiale invitantan organizon, pilotas nin tra la eniraj kontroloj al sia stando. Dum ni staras tie kaj ricevas niajn foirajn legitimilojn mi klopodas interkonatiĝi kun aliaj. Nicolas, la organizanto

de la terminologia laboro ĉe UIC en Parizo, Maria, tradukistino ĉe la sveda fervojo, Małgorzata el Pollando, Ognew el Serbio ... Nur parto de la grupo ĉeestas. La aliaj venos morgaŭ nur por la laborkunsido. Ni decidis inspekti kelkajn foirajn standojn kaj poste taksiumi al la marbordo, ĉar la origina plano, en posttagmezo viziti la konteneran havenon ne funkcias. Komuna tagmanĝo en fiŝrestoracio estas oportuna okazo proksimiĝi al la aliaj grupanoj. Elirante la restoracion Sergey reve rigardas al la maro kaj interŝanĝas kelkajn polajn vortojn kun Malgorzata, kiu iom konsternite gardas lian dorsosakon kaj skoteron dum li en subkalsono trempas sin en la baltan maron. „Dek sep gradoj” li raportas kaj renodas sian kravaton. Mi ne atendu tro da formaleco.



Unua renkontiĝo de la terminologia grupo  
ĉe la stando de OSJD

La sekvan matenon ni vidas nin kaj la novalvenintojn en konferenca salono de *Amberexpo*. Juha-Heikki jam kaptis Tomas, la ĉeĥan kolegon, por ricevi respondojn pri la „nadlorelo fleksebla unuprofila” kaj diversaj aliaj blankaj makuloj en la „glosaro pri trakforkoj kaj trakokruciĝoj”. Vekiĝas la impreso, ke Juha-Heikki puŝanta kaj postulanta estas la motoro de la terminologia grupo. Kvankam la aliaj ŝajnas iom ĝenitaj, estas evidenta la respekto kiun li ĝuas pro sia laboremo kaj insistemo. Ĉiuj instalas siajn klapkomputilojn kaj regulas la retaliron. Nicolas atentigas pri la densa tagordo kaj komencas la sinprezantan rondon. Miavice mi priskribas la situacion en IFEF post morto de d-ro Heinz Hoffmann kaj anoncas daŭrigi la laboron sammaniere kiel li. La membroj de nia komisiono baldaŭ ricevos pliajn informojn. Kolektiĝis kvanto de malklaraĵoj en la datumkolekto kaj atendas la aldono de Esperanto en la jam menciita glossaro. Dum Sergey klopodas klarigi la taskaron de OSJD, mia najbarino sondas la ofertojn de retmagazeno por ŝuoj. Juha-Heikki flustras pri la glossaro. Supozeble la plimulto de la ĉeestantoj jam konas la prezentaĵon.

Nicolas per siaj klarigoj pri la IRS (International Railway Solutions) revekas la ĝeneralan atenton. La „Internaciaj Fervojaj Solvoj” anstataŭigas paŝon post paŝo la normfoliojn (UIC-Leaflet). Preskaŭ sescent ekzistas en angla lingvo, du trionoj estas reviziitaj kaj akceptitaj respektive retiritaj. Unu triono estas traktenda ĝis 2022. Mi volas scii, kiasence ili estas parto de nia terminologia laboro, ĉar ja ne temas pri pluevoluigo de la terminaro sed pri ties apliko. La respondo, ke formulante la normotekstojn ja aperas la terminoj enigendaj en la terminaron elvokas la bildon pri ovo kaj kokino. La argumento estas komprenebla, sed substrekas, ke la IRS estas afero por la fervojoj kaj la fervoja industrio, por kiuj ili estas destinitaj – ne por ni kiel Terminara Sekcio de IFEF. Nicolas plue prezentas la strukturajn regulojn de IRS kaj emfazas la ŝancojn de frua envolvigo de teknikaj fakuloj. Mi esperas, ke en la kazo de bezono sufiĉos la fakscio en nia IFEF-komisiono kaj ke ni povos profiti la kontaktojn de la UIC-terminologoj, se tiu fakscio ĉe ni mankos.

La temo „glosaroj” invitas Juha-Heikki denove partopreni la diskuton. La sekvontaj glosare traktendaj temoj estas „katenario” (en jam relative matura stato, do baldaŭ sur nia tablo), „pontoj kaj tuneloj” (nenio jam videbla), „elektronika biletvendado” (ĝis nun nur diskutbazo), „terlaboroj”, „normigita kargovagona akso 25-tuna” kaj pliaj. Glosaroj okupos nin atendeble la venontajn jarojn.

Juha-Heikki atentigas pri ekzisto de aliaj, paralelaj ankaŭ fervojtemaj terminaroj. IATE (Interactive Terminology for Europe) ankaŭ pruntas enhavojn de la UIC-terminaro. IEC (International Electrotechnical Commission) aperigas terminaron pri signalado. „Ĉu ne eblas transpreni la enhavojn de aliaj terminaroj?” Ne eblas, ĉiu termino devas esti kontrolata kaj eŭropaj institucioj ne estas decidaj en mondvaste aganta organizo.

Nicolas jam en antaŭaj retmesaĝoj menciis problemojn en rilato al la firmao liverinta la programsistemojn per kiu la terminaro estas redaktata kaj publikigata. Li menciis neplenumitajn promesojn, malemon investi evoluigan laboron kaj ĝeneralan inertecon reagante al demandoj kaj bezonoj de klientoj. Konsekvence UIC serĉis alternativon kaj trovis pli favoran svedan oferton TermWeb, kiu strukture estas pli



aktuala, pli facile adaptebla kaj pli potenca ol la aktuale disponeblaj rimedoj. Kie hodiaŭ necesas labori per unu rimedo (TermEdit) por redakti kaj per dua rimedo (RailLexic) por prezenti, estonte ambaŭ estos du vizaĝoj de la sama programo kaj ĉiu kontrolita kaj konfirmita enhavo estas disponebla por serĉantaj abonantoj sen aparta komisiono transmigrigi ĝin de unu al alia sistemo. Alia avantaĝo estas la estonta ebleco aldoni fotojn, desegnaĵojn aŭ aliajn netekstajn mediojn aŭ ligilojn al la datumkolekto. La paŝo de unu al alia firmao estas decidita jam en Junio, la dato ankoraŭ ne. La procedo similas malfacilan divorcon.

La diskuto estas streĉa. La angla estas laborlingvo kaj miaj konoj de la angla lingvo restis sur la nivelo de 1973, kiam mi forlasis la lernejon, kaj ili ne esence progresis. Kiam dum la posttagmeza kafo Sergey invitas al vespera bierumado, mi preferas rezigni por indulgi mian kapon.

Matene atendas nin Gustav el Svedio por koncize enkonduki en la laboron per TermWeb. Ĝi aspektas facila kvankam ĉiu scias, ke la problemoj malkovriĝas dum apliko antaŭ la skribtablo, ne tie ĉi en aranĝita eksperimenta sceno kun stoketo da ekzemplaj datumoj kaj libere fiksitaj rajtoj. Tamen Gustav konvinkas min, ke la decido por TermWeb estis bona kaj ĝusta.

Proksimiĝas la tagmezo kaj multaj strebas al la horloĝo, surmetas mantelon aŭ ŝteliras antaŭ la pordon por mendi taksion. Nur Anna el Svedio rezervis la semajnfinojn por viziti Gdanskon. Sed ŝi ankoraŭ volas babili kun samlandano.

Mi strebas al la tramhaltejo, ĉar mi havas liberan posttagmezon kaj antaŭe sukcese kontaktis Jagoda de Toronto, la triurba Esperanto-grupo. Ni interkonsentis rendezuon je la 14-a horo apud la „Ora Pordego”. Ŝi venas ne nur kun la verda rekonilo, sed ankaŭ kun respektinda delegacio kvarpersona por montri al mi elekton de vidindaĵoj en la zorge rekonstruita urbocentro. La komence menciita Arthur Schopenhauer ne ludas rolon – male Daniel Gabriel Fahrenheit, pri kiu memorigas grandioza termometro sur la „longa foirplaco”.

En la urbodomo estas instalita ekspozicio kun dokumentoj pri la tempo antaŭ okdek jaroj, kiam interretaj streĉoj provokitaj de ŝovinisma

propagando servis kiel preteksto por ĝuste tie kaj ĝuste tiam komenci la duan grandan militon de la pasinta jarcento. Mallaŭta admono troviĝas en alia etaĝo. La skribtablo de la gdanska urbestro Adamowicz staras en vitrino, unuavide kiel ĵus forlasita por viziti la koncerton de karitata orkestro, dum kiu li estis mortvundita pro tranĉilatako. Ĉu sole malkontento pri la propra sorto, ĉu aldone pogromeca politika atmosfero praviganta perforton estas motivo – demando disdividas la enloĝantojn de la urbo.

Ni harmonie konsumas kafon kaj kelkajn frandaĵojn en stratkafejo. Jagoda rakontas pri la ĵus pasinta „Esperanto sur la strando” kaj elegante disdonas taskojn por la sukceso de la venontjara aranĝo. Mi notas „serĉi paganajn kutimojn en Germanio” kaj esperas, ke mi trovos iun malnovan libron en nia biblioteko.

La geamikoj akompanas min ankoraŭ ĝis hotelpordo. Dum ili disiras mi komencas enpaki mian kofron por ne perdi tempon antaŭ la frumatena revojaĝo.

**Guido Brandenburg, TK-sekretario**

---

## **Transponta Kongreso (TRAKO)**

**kaj 72-a IFK de 29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020 en Frankfurteto**

Ĉu necesas ankoraŭ atentigi pri la ekzisto de du Frankfurtoj distingataj per la riveroj apud kiuj ili situas? Ĉu necesas substreki ke inter Frankfurt apud Main kaj Frankfurt apud Odoro estas distanco de pli ol sescent kilometroj?

Distingo do necesas kaj ni volonte akceptas la kutimon de Ronaldo, nia surloka matadoro, kiu menciante sian hejmurbon preferas paroli pri „Frankfurteto”.

Frankfurteto pasigis jarcentojn en la ombro de la granda najbaro Berlin, urbo en provinco, sidejo de distrikta administracio, de altlernejo ligita al eminentaj nomoj - forlokita tamen de pasanta potenculo, kiu kiel ŝtormo trakuris la tutan Eŭropon. Plaĉis al Napoleono ŝovi la fakultatojn de Frankfurteto al la vroclava Leopoldina kaj la tradicia universitato Viadrina, edukinta interalie la revolucieman Thomas Müntzer, la sciencistojn Wilhelm kaj Alexander von Humboldt kaj la verkiston Heinrich von Kleist por la daŭro de 180 jaroj estingiĝis.

Post la disfalo de la napoleona regno kaj la novordigo de Eŭropo sekvis jaroj de relativa trankvilo en la sino de la brandenburga provinco.

Sekve de la dua mondmilito la urbo spertis la dividon kaj la situon de limurbo – pli vere de du limurboj - kaj la strukturajn sekvojn de tiu rolo. Ĝi spertis esti finstacio, spertis atendovicojn, dokumentokontrolojn, doganon.

Des pli alte Frankfurteto kaj Słubice sur la alia Odro-flanko hodiaŭ taksas la malfermon de la muroj, kiu redonacis la eblecon senĝene promeni trans la limon por viziti geamikojn aŭ kulturajn aranĝojn aŭ nur por butikumi. La enloĝantoj havas la fortan deziron konservi kaj vivi tiun komunecon.

Nelaste tial en Frankfurteto maturiĝis kaj en 1991 realiĝis la ideo pri novfondo de la universitato Viadrina kiel Eŭropa Universitato kaj lumtura projekto kun programo akcentanta internaciisme kaj interfakte la evoluigon de la regiono ambaŭflanke de la Odro-rivero, subtenanta la kunlaboron sciencan kaj kulturan inter Germanio kaj Pollando kaj donanta impulsojn al la tuteŭropa integriĝo.

En 1992 la Eŭropa Universitato Viadrina Frankfurt kaj la Adam-Mickiewicz-Universitato Poznan decidis fondi komunan kolecion kaj konstruigi ĝin en Słubice. „Collegium Polonicum“, la pola kolegio, inaŭgurita en 1998 hodiaŭ ofertas studeblecojn pri juraj kaj konstituciaj sistemoj en okcidenta kaj meza Eŭropo, pola lingvo kaj kulturo, interkulturaj komunikaj procedoj, evoluaj aspektoj en rilato al la EU-vastigo orienten, konservo de materia kultura heredaĵo kaj multajn pli. Sur tiu grundo kaj en tiuj konstruaĵoj ni decidis okazigi TRAKO-n, la TRANspontan KONgreson, komune kun la germanaj kaj la polaj nefervojistaj esperantistoj. La universitato Viadrina kaj la pola kolegio estos niaj kongresejoj.

Ni klopodas pri densa kaj interesa programo el fakaj kaj artaj elementoj, vizitoj fakaj kaj turismaj, informaj kaj ĝueblaj per ĉiuj sensoj. Mi volas mencii nur la unikan biosferan protektejon en la *Spree*-arbaro, celon de la tuttaga ekskurso.

Loĝado eblos sur ambaŭ flankoj de la Odro. Ni ne peras ĉambrojn sed nur donas sugestojn pri hoteloj kaj pri studentaj loĝejoj administrataj de la pola kolegio.

Aliĝo eblas per diversaj vojoj:

- la tradicia – kopii la paperan aliĝilon en tiu-ĉi IF-eldono kaj sendi ĝin en koverta al la adreso **BSW-Ortsstelle Werk Kassel, Freizeitgruppe Esperanto, Frasenweg 20-36, DE-34128 Kassel (Germanio)**
- la praktika – skani la plenigitan aliĝilkopion kaj sendi ĝin retpoŝte al la adreso **ifk.aligho@esperanto.de**
- la moderna – uzi la dialogan formularon en la dulingva (germana kaj Esperanto) retejo de la kongreso **www.esperanto.de/ifk**

Hoteloj konvenaj laŭ loko kaj prezo:

**City-Park-Hotel (3-stela)**

Lindenstraße 12, 15230 Frankfurt (Oder), Germanio, [info@citypark-hotel.de](mailto:info@citypark-hotel.de)

tel. +49 335 55320

piedvojo al fervoja stacio: 750 m, al Collegium Polonicum: 1.600 m

**City-Hotel Residence Frankfurt (3-stela)**

Bahnhofstraße 11, 15230 Frankfurt (Oder), Germanio, [info@hotel-city-residence.de](mailto:info@hotel-city-residence.de)

tel. +49 335 55320

piedvojo al fervoja stacio: 240 m, al Collegium Polonicum: 2.000 m

**Hotel zur alten Oder (3-stela)**

Fischerstraße 32, 15230 Frankfurt (Oder), Germanio, [info@zuraltenoder.de](mailto:info@zuraltenoder.de)

tel. +49 335 556220

piedvojo al fervoja stacio: 240 m, al Collegium Polonicum: 1.100 m

**Hotel Kaliski (3-stela)**

Jedności Robotniczej 13, 69-100 Słubice, Pollando, [rezerwacje@hotelkaliski.pl](mailto:rezerwacje@hotelkaliski.pl)

tel. +48 95 758 37 35

piedvojo al fervoja stacio: 2.200 m, al Collegium Polonicum: 350 m

(daŭrigo sur paĝo 129)

Transponta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice  
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020



## ALIĜILO

por la 72-a kongreso de IFEF  
29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020  
*Frankfurt (Oder), Germanio*  
*Słubice, Pollando*

Retadreso por aliĝiloj:  
[ifk.aligho@esperanto.de](mailto:ifk.aligho@esperanto.de)

**LKK-adreso:** BSW-Ortsstelle Werk Kassel  
Freizeitgruppe Esperanto  
Frasenweg 20-36  
DE-34128 Kassel (Germanio)

**Kongresa retpaĝo:** <http://www.ifef.net>

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝdato
Adreso		
Hejma Telefono:		Poŝtelefono:
Ret-adreso:		
IFEF-ano jes / ne viro / virino (trastreku aŭ nuligu ne taŭgajn)		

Kotizo en Eŭro		ĝis 31.12.2019	ĝis 31.03.2020	poste	pago
<b>IFEF-membro</b>	A-landano (laŭ UEA)	80	95	110	
	A-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	50	65	80	
	B-landano (laŭ UEA)	60	70	80	
	B-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	40	45	55	
<b>ne IFEF-membro</b>	A-landano (laŭ UEA)	110	125	140	
	A-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	80	95	110	
	B-landano (laŭ UEA)	80	90	100	
	B-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	60	65	75	
intera sumo					

		intera sumo			
Ekskursoj en Eŭro		ĝis 31.12.2019	ĝis 31.03.2020	poste	
E1:	Kleist-promeno	5	5	5	
E2a:	vizito al sistemŝanĝa stacio <i>Oderbrücke</i>	5	5	5	
E2b:	vizito al regejo B1	-	-	-	
D1:	fervoja muzeo <i>Letschin</i> , tagmanĝo, memorejo <i>Seelow</i>	30	30	30	
D2:	pionira fervojo <i>Wulheide</i> , tagmanĝo	30	30	30	
T1:	<i>Spree</i> -Arbaro, boatado, kukumoj, tagmanĝo, kafo, soraba kulturo	55	65	70	
<b>Postkongreso</b>	<i>Leipzig, Halle</i>	195	210	225	
Libervola donaco al la kongresa kaso					
					finna sumo

**Kongresa konto:**

Konto: Andreas Diemel IFEF Ffm GEFA

IBAN: **DE16 5009 0500 0000 9537 29**, BIC: **GENODEF1S12**Pagocelo: **72-a IFK antaŭnomo, nomo**

- Ĉiu partoprenanto bonvolu pleniĝi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al la retadreso [ifk.aligho@esperanto.de](mailto:ifk.aligho@esperanto.de)
- Sendu la pagon al la indikita banko-konto de GEFA. Oni traktos la aliĝon nur subskribitan kaj nur post alveno de la pago.
- Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciuj precizajn informojn pri la koncerna persono: nomon, landon, kompletajn kontaktadresojn.
- Kongreskotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de Marto antaŭ kongreso.
- LKK konfirmos per konfirmilo la akcepton de ĉiu aliĝilo, post la ricevo de la koncerna pago, per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
- LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn pro granda inflacio aŭ se aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.
- Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Frankfurt (Odoro) / Stubice (Germanio, Pollando) kaj por la postkongreso en Halle (Germanio)
- Mi konsentas / ne konsentas, ke mia retadreso aperu en la kongresa libro (forstreu ne-taŭgan indikon).
- Invito al partoprenonto ekster Eŭropa Unio estos sendata nur post ricevo de subskribita aliĝilo.

Loko, dato:

Subskribo:

## PROVIZORA PROGRAMO de la 72-a IFK (29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020)

<b>Vendredo</b> 29.05.2020	12.00 – 20.00	<b>Alveno</b>
	19.00 – 20.00	IFEF-estrarkunsido
	20.00 – 22.30	Interkona vespero de GEA, PEA kaj IFEF
	21.00 – 23.00	Trankvilejo
<b>Sabato</b> 30.05.2020	09.00 – 10.00	<b>Akcepto, gazetara konferenco</b>
	09.30 – 21.00	<b>Ekspozicioj</b>
	10.00 – 12.00	<b>Kongresa malfermo de GEA, PEA kaj IFEF</b>
	12.00 – 13.00	<b>Komuna foto</b>
	14.00 – 18.00	<b>Eŭropa Esperanto-Unio</b>
	14.00 – 16.00	<b>Enkonduka Esperanto-kurso</b>
	14.00 – 20.00	<b>Libroservoj</b>
	14.00 – 18.00	<b>Movada Foiro</b>
	14.00 – 16.00	<b>Urbo-promeno E1 (<i>Kleist-promeno</i>)</b>
	16.00 – 18.00	<b>Urbo-promeno E3 (<i>Ŝtubfurt-promeno</i>)</b>
	14.30 – 15.30	<b>Prelego regiona</b>
	15.30 – 18.00	<b>Fakprelegoj 1</b>
	16.00 – 18.00	<b>Paroliga Esperanto-kurso</b>
	20.00 – 22.30	<b>Pola festvespero</b>
	21.00 – 23.00	<b>Gufujo</b>
	<b>Dimanĉo</b> 31.05.2020	08.00 – 09.30
09.30 – 21.00		<b>Ekspozicioj</b>
09.30 – 11.30		<b>Prelego Viadrina, Collegium Polonicum</b>
09.30 – 13.00		<b>Membrokunveno GEA</b>
09.30 – 13.00		<b>Membrokunveno PEA</b>
10.30 – 13.00		<b>IFEF-estrarkunsido</b>
14.00 – 18.00		<b>Sanmarina Universitata Sesio 1</b>
14.00 – 16.00		<b>Enkonduka Esperanto-kurso</b>
14.00 – 18.00		<b>Libroservoj</b>
14.00 – 16.00		<b>Urbo-promeno E1 (<i>Kleist-promeno</i>)</b>
16.00 – 18.00		<b>Urbo-promeno E3 (<i>Ŝtubfurt-promeno</i>)</b>
16.00 – 18.00		<b>Paroliga Esperanto-kurso</b>
20.00 – 22.30		<b>Muzikvespero</b>
21.00 – 23.00		<b>Trankvilejo</b>
<b>Lundo</b> 01.06.2020	09.00 – 11.00	<b>Prelegoj diskutrondoj</b>
	09.00 – 11.00	<b>Enkonduka Esperanto-kurso</b>
	09.00 – 14.00	<b>Libroservoj</b>
	09.30 – 21.00	<b>Ekspozicioj</b>
	11.00 – 13.00	<b>Paroliga Esperanto-kurso</b>
	11.00 – 12.00	<b>Invito al 73-a IFK en Ĉeĥio</b>
	12.00 – 13.00	<b>Kongresfermo GEA, PEA</b>
	14.00 – 18.00	<b>Sanmarina Universitata Sesio 2</b>
	16.00 – 18.00	<b>Laborgrupoj, raportoj</b>
	14.00 – 18.00	<b>Vizitoj E2a (<i>Oderbrücke</i>), E2b (<i>regejo B1</i>)</b>
	19.30 – 22.30	<b>Faka Komisiono, Teminara Komisiono</b>
	21.00 – 23.00	<b>Gufujo</b>

<b>Mardo</b> 02.06.2020	09.00 – 12.00	<b>IFEF-Plenkunsido, Movadaj aferoj</b> <b>Enkonduka Esperanto-kurso</b> <b>Ekspozicioj</b> <b>Paroliga Esperanto-kurso</b>
	09.00 – 11.00 09.30 – 21.00 11.00 – 13.00	
<b>Merkredo</b> 03.06.2020	12.30 – 19.30	<b>Ekskurso D1 (<i>Letschin fervoja muzeo, Seelow-altajoj</i>)</b> <b>Koncertvespero</b> <b>Gufujo</b>
	20.00 – 22.00	
	21.00 – 23.00	
	09.00 – 19.00	
<b>Ĵaŭdo</b> 04.06.2020	09.00 – 13.00	<b>Tuttaga ekskurso T1 (<i>Spree-Arbaro</i>) kun tagmanĝo, posttagmeza kafo, soraba distro</b>
	09.00 – 11.00	
	09.30 – 21.00	
	11.00 – 13.00	
	12.30 – 19.30	
<b>Vendredo</b> 05.06.2020	20.00 – 22.30	<b>Fakprelegoj 2</b> <b>Enkonduka Esperanto-kurso</b> <b>Ekspozicioj</b> <b>Paroliga Esperanto-kurso</b>
	21.00 – 23.00	
	22.00 – 24.00	
	09.00 -	
		<b>Ekskurso D2 (<i>Parkfervojo Wuhlheide</i>)</b> <b>Kongresfermo IFEF</b> <b>Gufujo</b> <b>Adiaŭo en restoracio</b>
		<b>Forveturo hejmen aŭ al postkongreso</b>

**PROVIZORA PROGRAMO DE LA POSTKONGRESO (5-a ĝis 8-a de Junio 2020)**

<b>Vendredo</b> 05.06.2020	09.00 –	<b>Aŭtobusa vojaĝo al <i>Leipzig</i>, promeno al la vidindaĵoj kaj okazo tagmanĝi, poste pluvojaĝo al Halle (Saale), vesperaj distraĵoj</b>
<b>Sabato</b> 06.06.2020		<b>Vizito al la fervoja muzeo <i>Halle</i> (filio de germana fervoja muzeo <i>Nürnberg</i>), Butikumado, Esperantista Koruso Halle</b>
<b>Dimanĉo</b> 07.06.2020		<b>Gvidata urbopromeno tra Halle, Okazoj viziti la Händel-domon, fruhistorian muzeon (astronomia disko de Nebra), salproduktan muzeon, <i>Bauhaus</i>-konstruaĵojn, sekvi spurojn de Martin Luther kaj pli, desperaj distraĵoj</b>
<b>Lundo</b> 08.06.2020	09.00 -	<b>Forveturo hejmen</b>



(daŭrigo de paĝo 124)

### Hotel Villa Casino (3-stela)

Mickiewicza 11, 69-100 Słubice, Pollando, [hotel@villa-casino.pl](mailto:hotel@villa-casino.pl)

tel. +48 515 970 142

piedvojo al fervoja stacio: 2.200 m, al Collegium Polonicum: 140 m

**Studentaj domoj „Iuventa“, „Gaudium“, „Arcadia“, „Sapientia“ kaj „Forum“**

Ulica Piłsudskiego 13, 14, 15 kaj 16, 69-100 Słubice, Pollando,

[dsslubice@amu.edu.pl](mailto:dsslubice@amu.edu.pl)

tel. +48 61 829 6903

piedvojo al fervoja stacio: 2.900 m, al Collegium Polonicum: 950 m

Pliaj ofertoj haveblaj ĉe turisma oficejo [info@tourismus-ffo.de](mailto:info@tourismus-ffo.de)

tel. +49 0335 610080 0

oni parolas germane, pole kaj angle.



Universitato Viadrina, malfermo de la kongreso.

foto: K.-H. Janßen, Wikimedia



Kanalo en Spree-arbaro.

foto: Ra Boe, Wikimedia



La internacia ponto.

foto: Spyrosdrakopoulos, Wikimedia

## Bitarkivo kaj Bitotekoj

En la esperanta mondo oni produktas jare centojn eĉ milojn da publikaĵoj, la

**BitArkivo.org**

NI PRIZORGAS LA ESPERANTAN KULTURON  
esperantistoj kolektas librojn, revuojn kaj iujn ajn objektojn kiujn ili konservas en propra ŝranko.

Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj klopodas konservi la materialon, sed ne sufiĉas konservi ĝin en fizika loko. Ĝi estas malfacile atingebla por eventualaj legantoj. Kvankam ili ekkomencis prepari materialon en cifereca formato, ĝis nun, ĝi ankoraŭ ne estas je dispono.

Ni, IFEF, antaŭ jaroj komencis skani kaj produkti elektronike nian revuon "Internacia Fervojisto" kaj aliajn publikaĵojn: "Fervojfakaj Kajeroj", "TeKu", revuojn de landaj asocioj de IFEF. Ili diversmaniere aperas en retejoj, ĉefe en [www.ifef.net](http://www.ifef.net), sed ankaŭ en aliaj paĝaroj. Ĝi estas bona solvo, sed nur la interesitoj sukcesas trovi ilin vojaĝante tra la reto.

Nun je internacia nivelo kaj en kelkaj landoj aperis Bitarkivo kaj Bitotekoj, (Bito+Arkivo; Bito+Biblioteko). Ciferecaj bibliotekoj kiuj prizorgas la esperantan kulturon.

Rilate al IFEF en Bitarkivo mi jam aperigis la jenon: Fervojfakaj Kajeroj, Fervoja Esperantisto (ekde la jaro 1910), La Fervojisto (1923-1930), Internacia Fervojisto (1948-2018), Itala Fervojisto. Jen la retadreso por trovi ilin: <https://www.bitarkivo.org/hejmo>.

Bitotekoj troveblas en Italio kaj Hispanio.

Ekde la jaro 2015 Hispana Esperanto-Federacio funkciigas interretan bibliotekon "Bitoteko". En ĝi aperas kolektoj de elektronikaj versioj de multaj kaj interesaj Esperantaj literaturaj materialoj, ne nur en hispana, sed ankaŭ en internacia nivelo. [www.bitoteko.esperanto.es](http://www.bitoteko.esperanto.es) .

Al la itala bitoteko mi mem kunlaboras, mi aldonis, ĝis nun, 60 bultenojn "Itala Fervojisto". Jen la ligilo:

<http://www.bitoteko.it/collections/show/5>.

## Transsiberia Fervojo - daŭrigo

7. Ankoraŭ unu kialo de sukceso estis *la ĝusta financa politiko*. Vitte rememoris: “Nia ĉefa bezono estis la mono”. Ekde 1895 li enkondukis



Laboristoj dum la konstruado de la fervojo.

(fonto: zen.yandex.ru)

la senliman interŝanĝon de la rublo kontraŭ oro. Dum 20 jaroj, ĝis la Unua Mondmilito, la rusaj bankbiletoj kaj la moneroj povis esti interŝanĝitaj kontraŭ la oro tutmonde, libere kaj senlime. La financa reformo de Vitte plifortigis la kurzon de la rublo, plibonigis la investklimaton en Rusio kaj allogis multajn rusajn kaj eksterlandajn kapitalposedantojn investi en la ekonomion. Samtempe la politiko de Vitte kiel ministro de la financoj estis ĉiam fleksiĝema kaj pragmata. Dum la konstruado de la Transsiberia Fervojo li plurfoje riskis inflacion, se la situacio tion postulis.

8. La naciismo de la registaro kaj la ŝtata karaktero de la entrepreno ne ekskludis *la partoprenon de la eksterlanda kapitalo en diversaj aspektoj de la konstruado*. Tiel la franca-belga Compagnie Internationale de Wagons-Lits partoprenis en la konstruado de la metalaj pontoj trans Siberiajn riverojn.

9. *La militista strategia karaktero* de la Transsiberia Fervojo signifis, ke la Ministerio de la Milito, la armeo, la generaloj estis forte engaĝitaj en la tuta afero. Ĉie regis la militarismo. Ne la polico, sed armeo subtenis la ordon kaj sufokis strikojn.

10. La Transsiberia Fervojo dankis sian sukceson ankaŭ al *favoraj historiaj cirkonstancoj*. Post la liberigo de servutuloj en 1861 Rusio konis rapidan kaj ŝtorman disvolviĝon de kapitalismo. La rusaj studentoj hodiaŭ lernas la ciferojn de la ekonomia progreso de sia lando en la fino de la 19-a jarcento kun larmoj en la okuloj. Ĉirkaŭ la jaro 1900 Rusio zorgis pri 9,3% de la tutmonda brutta nacia produkto. Nur Usono disvolviĝis tiam ankoraŭ pli rapide. Hodiaŭ la brutta nacia produkto de Rusio konstituas apenaŭ 3% de la tutmonda. Certe la Federacio de Rusio estas malpli granda ol la imperio de la caroj, sed ne trifoje malpli granda.



La ekonomia progreso de Rusio antaŭ kaj post la liberigo de la servutuloj en 1861 (fonto: ru.wikipedia.org)

11. Krom tio, la Rusio de Aleksandro la Tria konis senkomparan periodon de *paco*. Post la venko super la turkoj en la Balkano en 1878 la rusoj ne militis dum dudek kvin jaroj, ĝis la konflikto kun Japanio en 1904.

Malgraŭ la reakcia kaj

arkaika politika reĝimo la lando ĝuis provizore atmosferon de pacama rapida disvolviĝo, de optimismo kaj patriotismo.

12. *La giganta skalo de la entrepreno* estis mem unu el la kialoj de sukceso. La homoj en Rusio ĉiam pli volonte kaj kun pli granda sukceso koncentras siajn fortojn kaj resursojn sur la taskojn grandiozajn, de historia signifo. La konstruado de la plej longa fervojo en la mondo estis unu el la taskoj kiujn la rusoj ĉiam preferas. Tio kreas nacian elanon, la kolektivan entuziasmon kiun la malgrandaj ĉiutagaj aferoj ne povas krei.

## La ombraj flankoj

La konstruistorio de la Transsiberia Fervojo havis ankaŭ ombrajn flankojn. Post dekdu jaroj de energiaj laboroj oni *ne sukcesis same rapide fini* la fervojon. Ĝis 1903 ĝi atingis, de oriente kaj de okcidente, *Ĥabarovsk*, sur la rivero *Amur*. Do, ĝi estis praktike finita. Tamen restis du gravaj problemoj. Mankis ankoraŭ la fervojponto trans la tre larĝan *Amur*. Sed la plej akuta problemo estis la lago Bajkalo. La fervojo iris ĝis la lagbordo por daŭri de la alia bordo. Barono Carl Gustaf Mannerheim,



Glaciompilo je la lago Bajkalo  
(fonto: pribajkal.ru)

la estonta prezidento de Finnlando, tiutempe oficiro de la rusa armeo, rememoris: “Somere oni devis trapasi la Bajkalon sur ŝipoj, ĉe kio ŝarĝi kaj malŝarĝi daŭris ekstreme longe. Vintre la trajnoj povis daŭrigi la vojon sur la reloj konstruitaj tutsimpe sur glacio”. Dum la

glacio estis ankoraŭ tro malforta pro la reloj, pasaĝeroj kaj pakaĵoj uzis glaciompilon.

En 1904-1905 la militon kontraŭ Japanio, por kiu devis servi la Transsiberia Fervojo, Rusio perdis, interalie pro tro malalta kapablo de la nova fervojo por milittransporto kaj sekve pro la problemo de la Bajkalo. La relojn laŭlonge de la suda lagbordo oni konstruis nur en 1905, mallonge antaŭ la fino de la milito. Sed ankaŭ poste la seninterrompa vojaĝo ĝis al *Vladivostok* restis dum multaj jaroj nebla, ĉar la fervojponto trans la *Amur* finiĝis nur en 1916, meze de la Unua Mondmilito, sen festoj kaj paroladoj.

Kial la Transsiberia Fervojo restis tiel longe nefinita? Jam en unuaj jaroj de la dudeka jarcento oni *transpaŝis la buĝeton* de la konstruado je 200%. Alivorte, la fervojo kostis trifoje pli ol la origina taksado. Ĉu pri tio kulpis precipe la korupto, al mi tio ŝajnas nedubbla. Krome, pro malbona estrado, la nova fervojo en la komenco tute *ne profitodonis*. La situacio ŝanĝiĝis nur en la jaro 1907, kiam komenciĝis la translokiĝo

de centoj da miloj da kamparanoj al Siberio.

Sed la plej grava kaŭzo estis la fakto ke jam ekde 1897, iniciate de Sergej Vitte mem, la registraro translokis preskaŭ ĉiujn laborfortojn kaj resursojn al *la konstruado de la pli rekta kaj pli mallonga vojo*, la tiel nomata Ĉinia Orienta Fervojo, kiu konektis la rusajn urbojn *Ĉita* kaj *Vladivostok* per linio rekta, preter la teritorio de Ĉinio. Hodiaŭ la Ĉinia Orienta Fervojo ĉiam ankoraŭ ekzistas, sed jam pli ol 60 jarojn ne plu apartenas al Rusio.

### La historiaj sekvoj

Finfine mi volas trakti koncize la historiajn sekvojn de la Transsiberia Fervojo.

#### 1. *La industriigo kaj la disvolviĝo de la urboj en la Azia parto de Rusio.*



Novonikolajevsk (= *Novosibirsk*), 1913  
(fonto: ru.wikipedia.org)

La provincaj urboj de komercistoj kiel *Omsk*, *Krasnojarsk*, *Irkutsk*, *Ĉita* kaj *Ĥabarovsk* iĝis grandegaj industriaj centroj. Kiam en 1907 oni komencis elfosi la karbon en la sudoriento de la Siberio, naskiĝis la nuntempa urbo Kemerovo. La vilaĝo *Novonikolajevsk* transformiĝis, kiel mi jam diris, en la tria plej granda urbo de Rusio,

*Novosibirsk*, la ĉefa ekonomia centro de Okcidenta Siberio. Ĉie en Siberio kreskis armilfabrikoj. Krom tio, la fervojo mem kreis gigantan industrion: karbominejoj, segejoj, diversaj riparejoj...

#### 2. *La plirapidigo de la kamparana koloniado de Siberio.*

En 1908-1909, sekve de la reformo de la ĉefministro Pjotr Stolipin, ĉiujare 600 000 rusaj kaj ukrainaj kamparanoj iris orienten per la transsiberiaj trajnoj. Tamen pro la ekstrema malriĉeco de la kamparanoj, pro la malbona organizo de la transporto (problemoj kun kreditoj kaj kun senkostaj trajnbiletoj por la translokiĝantoj, kaj tiel plu) kaj neeviteble pro la korupto, 20% de translokiĝantoj poste revenis. Post la pafmurdo de

Stolipin en 1911 liaj reformoj fakte jam haltis.

3. *La disvastigo de la kulturo kaj de la instruado.* Eble la plej senpera kontribuo de la Transsiberia Fervojo al la rusa kulturo estis multaj



La stacidomo de *Sjudjanka*, apud la lago Bajkalo.  
(foto: Vladimir Ronin)



La stacidomo de *Vladivostok*.  
(foto: Vladimir Ronin)

stacidomoj, konstruitaj en laŭmodaj stiloj de la frua 20-a jarcento, precipe en la secesi-stilo kaj la tiel nomata novrusa stilo, imitaĵo de la mezepoka rusa arkitekturo.

4. *La disvastigo de la Ortodoksismo.* Ekde 1896 pendolis per la Transsiberia Fervojo speciala vagonpreĝejo. Ĝi servis por misia laboro de la Rusa Ortodoksa Eklezio inter aŭtoktonaj popoloj de Siberio.



La vagonpreĝejo en la Siberio.  
(fonto: tass.ru)



5. *La disvolviĝo de turismo,* kun reklamafiŝoj en la secesi-stilo por propagandi vojaĝojn de la Atlantiko ĝis la Pacifiko, de la Okcidenta Eŭropo ĝis Ĉinio.

Semajna gazeto “Le Transcontinental”,  
Bruselo, 1899 (fonto: meisterdrucke.com)



6. *La plivastigo de la sistemo de reprazalioj en la Rusa imperio*: multaj novaj lokoj por politikaj ekzilitoj kaj punlaboristoj. Kun la transsiberiaj trajnoj forveturis en Orientan Siberion unu post la alia la revoluciuloj Lenin, Trockij, Stalin .... La plimulto da malliberuloj estis transportitaj en tiaj vagonoj, la tiel nomata Stolipin-vagonoj, kiuj poste servos por la granda teroro de Lenin kaj Stalin.



La tiel nomata Stolipin-vagono  
(foto: mk.ru)

**Vladimir Ronin**

## **Agado en Landaj Asocioj**

### **Ĉu vi konas BAFE?**

Malgraŭ la malfondiĝo en 2018 de la Belga Esperantista Fervojista Asocio, multaj membroj de tiu asocio deziras daŭre esti membroj de IFEF. Starigita en 1909, IFEF estas asocio de esperantistoj celanta kunigi, pere de la Lingvo Internacia, diversfakajn profesiulojn de ĉiuj branĉoj de fervojo kaj transportado, sed ankaŭ la amikojn de fervojo en la tuta mondo.

En Malago dum ĉijara kongreso kunsidis la belgaj ĉeestantoj kaj la estraro de IFEF: interkonsente estis decidite fondi novan asocion **BAFE**

**(Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistoj).** La avantaĝo de tiu paŝo estas ke Belgio povas denove plene agadi en la faka organizo IFEF.

Membroj de BAFE ricevas la 6 numerojn de la revuo „Internacia Fervojisto” (IF) kaj rabaton dum IFEF-kongresoj.

**Se vi estas interesitaj, ni invitas vin membriĝi** (ĉu fervojistoj, ĉu nefervojistoj)!

La kontonumero de BAFE por (re)membriĝi: BE85 6105 5937 1106 je nomo de Margaretha Symoens.

La kontaktpersonoj de BAFE estas:

**Clara Bracke**, [clara.bracke@skynet.be](mailto:clara.bracke@skynet.be)

**Marc Cuffez**, [flandrio@hotmail.be](mailto:flandrio@hotmail.be)

**Kristin Tytgat**, [Kristin.tytgat@skynet.be](mailto:Kristin.tytgat@skynet.be)

Retpaĝo de IFEF: [www.ifef.net](http://www.ifef.net)

**Kristin Tytgat**

---

## **Kongreso de rumanaj gekolegoj**

La kongreso de la Rumana Esperanta Fervojista Asocio (REFA) okazis la 13-an de Septembro 2019 en Bukareŝto. Partoprenis delegitoj de la tuta lando, ĉar ĉijare temis pri elekto de la nova komitato por la sekvontaj tri jaroj.

Estis prezentitaj raporto pri la agado de REFA inter 2016-2019, financa raporto kaj strategia laborplano por la venonta periodo.

La raporto evidentigis ke, spite la agadon de kelkaj kluboj (Bukareŝto kaj Braŝovo), kie okazas ĉiusemajnaj renkontiĝoj kaj diversnivelaĵoj E-kursoj, ĝenerale la situacio de nia asocio ne estas tre esperiga. La junuloj ne aliĝas kaj la malnovaj membroj estas pli kaj pli malmultnombraj.

Sed malgraŭ la problemoj kiujn ni trapasas, pere de kelkaj antaŭviditaj projektoj ni esperas konservi kaj daŭrigi la fakan kaj amikecan kunlaboron kun ĉiuj fervojistoj esperantistaj.

Unu el niaj celoj estas eniri projekton de IFEF pri kunlaboro inter teknikaj fakultatoj, por kontaktigi rumanajn studentojn de la Politekniko en Bukareŝto kun tiuj kiuj aliĝis en Ĉeĥio kaj Pollando.

**Rodica Giuhat, prezidantino de REFA**

## **Kunlaboro kun trafikaj altlernejoj – la dua paŝo**

Kiel legantoj de IF vi jam scias. Jan Perner Trafika Fakultato de la Universitato Pardubice, IFEF kaj ĈeFEA subskribis kontrakton pri kunlaboro. En Februaro 2019 ĉiuj tri kontrakto-partneroj unuafoje organizis fakan seminarion „Eŭropaj fervojoj” por studentoj en Pardubice (Unua paŝo, IF 2019.2). Dum la kunsido en Pardubice IFEF-estraro decidis pri la subteno por 1 – 2 studentoj el Pardubice, kiu(j) povus partopreni IFEF-kongreson. Studento(j) devas pretigi referaĵon pri temo „Translima fervojtrafiko inter Ĉeĥio kaj Pollando” kaj komenci lerni Esperanton. Kune kun s-ro Matuška la referaĵo estos tradukita en Esperanton kaj prezentita dum la 72-a IFK en Frankfurt(O.)/Słubice. En Pardubice jam sin anoncis la unua studento-interesulo. Mi esperas, ke li bone plenumos ambaŭ kondiĉojn kaj ke ni komune iros al Frankfurto. Kunlaboro komenciĝas ankaŭ kun Trafika Fakultato de Poznana Politekniko (PL). La estraro klopodos kontakti trafik-fakultatojn en Bukareŝto (RO) kaj Žilina (SK) kaj tie proponi fakan kunlaboron. Se vi scias pri trafika altlernejo en via lando kaj havas ĉi tie fakan kontakton, skribu tion al aŭtoro aŭ redaktoro.

## **Jaroslav Matuška**

### **Alvoko**

En Aŭgusto 2019 estraranoj kaj ĉefkomitatano de IFEF ricevis postulon por demisio de Ladislav Kovář sekretario de Faka Aplika Sekcio (FAS) kaj samtempe redaktoro de „Fervojfakaj Kajeroj“. Dum IFEF-kongreso en 2019 s-ro Kovář fariĝis redaktoro de „Internacia Fervojisto“ kaj tiel samtempe IFEF-estrarano. Dum kongreso en la jaro 2020 devas esti elektota nova sekretario de FAS inter membroj de Faka Komisiono. Estraro kaj ĉefkomitatano de IFEF petas reprezentantojn de landaj asocioj ke ili anoncu al e-o kaj ĉ-k proponitajn kandidatojn por ĉi-tiu posteno ĝis la 31-a de Decembro 2019. Sendu etajn biografiojn pri viaj kandidatoj.

## **Ĉefkomitatano Zlatko Hinšt**

## Enhavo 2019

### IF 2019.1

La verda periodo	4
Aliĝilo por la 71-a IFK Malaga	8
Tagordo de la komitatkunsido 71-a IFK	10
Tagordo de la FK-kunveno 71-a IFK	11
Propono por ŝanĝo de GR de IFEF	11
Firma konekso inter Danio kaj Germanio	12
„Akvotrajno“?	15
Eŭropaj Fervojoj	18
D-ro Heinz Hoffmann	19

### IF 2019.2

Post dek ses eldonoj	24
Kandidatoj por taskoj en la estraro	25
Raporto de la kasisto pri la jaro 2018	30
Unua paŝo	33
Karavane de <i>Lahti</i> al Pekino – invito	35
La plej longa fervojtunelo en Ĉeĥio	36
Renovigo de IC3-kompletoj	38
Citybanan – la nova fervojlinio en	
Stokholmo	39

### IF 2019.3

Malalte al Berlino	44
Neniu rigardas	47
Pontvizioj	49
Jarraporto de la Sekretario pri la jaro 2018	51
Bonvenon en Malago	56
Memoroj pri nia fervojfaka terminologio	
d-ro Heinz Hoffmann	58

### IF 2019.4

Unika triopa kongreso	64
Solena malfermo	65
IFEF laboraj programeroj	66
Prelegoj	66
„Najbaroj“ – unuaj informoj pri la 72-a IFK	72
Protokolo pri la publika komitatkunsido	74
Raporto de ĉefkomitatano pri estrarelektoj	84
Listo de E-aranĝoj	84
Agado en landaj asocioj	86

### IF 2019.5

Triopa kongreso, Kultura progamo	92
Ekskursoj	95
Postkongreso	97
Grandrapidaj fervojlinioj antaŭenigas	98
„Fenestro al la mondo“ 72-a IFK	101
104-a UK Lahtio	102
Czech Raildays	102
Poŝtarta alvoko	103
Esperanto-stacio	103
Transsiberia fervojo	104
Agado de landaj asocioj – 49-a Landa	
Amika Renkontiĝo <i>Tiszafüred</i>	111

### IF 2019.6

Forpasis L.Ch. Zaleski-Zamenhof	116
Estrarkunsido en Poznano	116
Nadlorelo fleksebla unuprofila	118
Transponta kongreso (TRAKO)	122
Aliĝilo al la 72-a IFK	125
Bitarkivo kaj Bitotekoj	130
Transsiberia fervojo – daŭrigo	131
Agado en landaj asocioj	137